

## & Vokto kaj servistino:

< Rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4448. El sveda tradukis Martin Strid (2015 FLOrE).>

### (#Melodio:

<:29> (

o;so /(so3la sofa mi mifa so3la sofa mi do;)×

(&Rekantaĵe: re3mi fa faasofa mire doodore mi miifami re reeremi fareTi do3do do)

)×12 )+

### (&Strofoj:

'1 Kaj /vokto konsilion rajdis dunge servistinon ; kiu famis esti kaj lerta kaj rapida

(×.: ; **Hura hej, kato razita, tero, arbar', bona en far' ; jen kaĉosupo kun dolĉa gust'.**)

'2 Kaj selis li iranton sian, ĉevalinon buntan ; kaj rajdis li antaŭen sur vojo por li kurba.....

'3 Li rajdis ĝis li haltis sur la placo en la urbo ; renkontis servistinon bonan, ŝi vendis panon el korbo.....

'4 Aŭskultu servistino mia, ĉu vi ĉe mi laboros? ; Ricevos vi plej altan pagon, kiun iu volus.....

'5 Falĉilon novan petas mi kun ruĝaj dek orringoj ; kaj iros kun vi agron dum servistoj iras svingon.....

'6 Kaj bulkon panan petas mi por ĉiu baka pluko ; kaj sur tiu buteran uncon sur ĉiu kuko.....

'7 Kaj ruĝan jupon petas mi kun ruĝaj dek orŝnuroj ; La ŝtofo estu el Amsterdam', kudristo el Sud-Mojro.....

'8 Nutritan porkon ĉiuvendrede dum la fasto kaŝan ; kaj en sabatoj sekalan buŝelon se vi draŝas.....

'9 Kaj bovon petas mi, kaj la koloro estu bunta ; Unu korno estu rekta, l' alia estu kurba.....

'10 Kusenon bluan petas mi kun tute gruaj plumoj ; kaj felon volas mi surhavi el sep blankaj vulpoj.....

'11 Kaj ĉambbron grandan petas mi kun dek du litoj pretaj ; Mi tie noktripozos kun viaj servistoj lertaj.....

'12 La vokto rajdis hejmen re, krucumis en ĉiu strato ; Morton donus mi al tia, kaj pagon kaj manĝsaton..... )